

# VESPERTO



## LITERATURA FOLIO

Numero:214 .  
Marto 2010. 18-a jarkolekto

### Redaktanto:

Apáti Kovács Béla  
Kaposvár  
Béla király u. 44.  
H-7400 HUNGARIO  
Telefono: 82/ 410-664  
Retadreso: [espbela@t-online.hu](mailto:espbela@t-online.hu)  
Eldonanto: Kaposvára Esperanto  
Centro  
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

## Kial ni parolas?

Ĉu vi jam cerbumis, kial oni parolas?

Nun certe estas tiuj, kiuj diras: oni parolas por ke ni povu komuniki.

Sed kial ni komunikas per nia buŝo? La surdmutuloj kapablas komprenigi sin ankaŭ permane.

Eble ekzistus ankaŭ aliaj manieroj per kio ni povus ŝanĝi pensojn.

Iam mi legis en fantasta novelo, ke en la fora universo estis planedo, sur kiu la tieaj estaĵoj komunikis per koloroj.

Laŭ mi povus ekzisti ankaŭ aliaj ebloj. Ekzemple ni homoj eligus diversajn odorojn aŭ per la movigo de niaj okuloj dirus al nia kunulo niajn sentojn.

Interese, ankaŭ tiel ni estus komprenitaj, eĉ ni povus komuniki bonege.

Do, en la universo eble ne estas la unusola ilo la homa parolo. Sed tio estas certa, ke la raciaj estaĵoj ĉie komunikas por ŝanĝi pensojn.

Ne estus miraklo, se en iu tago ni devus ellerni ankaŭ ilian parolmanieron, aŭ krei helplingvon. Sed ĝis tiam ni klopodu disvastigi Esperanton, por ke tie ĉi sur Tero ni ne havu lingvajn malfacilaĵojn.

-Redaktanto-



## La maro de l' lingvoj

Junaĝe li pensis, ke sia gepatra lingvo sufiĉos komprenigi sin ĉie en la tuta mondo. Li ne kredis, ke alvenos tago de la rekono, ke per tiu ĉi amata lingvo estas perdita eksterlande.

Vane li malfermas buŝon por paroli, la tieaj homoj strange rigardas al li, kaj ili ne komprenas liajn pensojn.

Tio ege dolorigis lin. Ja lia patrino tiom dolĉe fabelis al li en tiu ĉi lingvo.

Kial tiuj homoj ne komprenas lin? Lia lingvo estas facila kaj belsona. Neeble, ke ekster la landlimoj oni ne komprenas lin.

Kiom da lingvoj ekzistas?

Li naĝas en la maro de l' lingvoj, sed li sentas de tempo al tempo elĉerpiĝas la forto, kaj baldaŭ li droniĝos en la lingvojn.

Li deziras kriegi: „Help’!“ sed voĉo ne elvenas el sia buŝo. Kial ĝi elvenus, kiam neniu komprenas lian parolon.

Hejme li ĉiam ridis pri eksterlandanoj, kiel ili balbutadis. Ilia vizaĝo estis komika.

Nun la mondo turniĝis. Lin ĉirkaŭas multaj, eĉ multegaj lingvoj. Ili sufokas la lingvoj.

Liberiĝi de ili. Sed kiel?

Li ne sciis. Ellerni ĉiom da lingvoj li ne estas kapabla. Eĉ sur la terglobo neniu!

Kio estas la solvo?

Help’! – Sed rapide, ĉar baldaŭe li droniĝas en la maron de l' lingvoj.

-Ŝaŝa-

## Poezio

### Bona Onjo Infankanto el Siĉuan- provinco elĉinigi Venlo FON

Malgranda turto kver-kveras ĝoje,  
alvenas al ni bon-bona onjo.  
Ŝi manĝas kun mi el sama poto,  
kaj loĝas kun mi en sama domo.

Dumtage iras ŝi kampkulturi,  
en hejm' balaas, kaj nutras porkojn,  
kaj min instruas en liberhoroj  
kaj panjon helpas por fari vestojn.

Maldolĉe? -- panjo al ŝi demandas.  
Ŝi diras: ve, ne, tre tre feliĉe.  
Ĉu vi demandas, ŝi kiu estas?  
Ŝi estas urba kadrino bona.



Diru avinjo, ĉu vi naskiĝis, kiel  
avino aŭ vi estis ankaŭ infano?

## Arbaro

Nun mi rakontas al vi tre interesan aventuron, kio okazis kun mi en malproksima arbaro.

Estis varma somera posttagmezo. Mi ege enuis kaj nur sidadis nenionfarante en la verando, kiam fremdulo alvenis nian vilaĝeton.

Ekvidante min li tuj venis al mi kaj ordonis:

-Akompanu min al la apudvilaĝa arbaro!

Li tiom surprizis min, ke mi apenaŭ povis ekparoli.

-Kial? – mi demandis mire.

-Tion nun ne demandu! En la arbaro vi ekscios ĉion.

Mi estis hipnotigita kaj mute sekvis lin.

Ĝis la arbaro li ne alparolis min. Mi ne sciis, kion li volas en la arbaro?

La fremdulo estis mezaĝa, alta viro. Liaj muskulaj ŝultroj iomete timigis min. Nur dumvoje mi komencis pensi, kiom stulta mi estis, kial senpripense sekvis lin.

Kiu estas tiu homo?

Mi ne sciis. Eble neniu konis lin en la vilaĝo.

Kial ni iras al la arbaro? Eble li estas bandito kaj li volas forrabi min.

Terure!

Kion mi faru? Sed jam mi ne povis returni min kaj hejmenkuri. Eble li havas ankaŭ armilon kaj se mi ekprovas rifuĝi, li mortpafos min.

Ĉe la arbarorando ni haltis. Li sugestis rigardis en miajn okulojn kaj diris:

-Ĉi tie inter la arboj estas trezoro. Nun ni serĉos ĝin.

-Ĉu trezoro? – mi ekmiris kaj preskaŭ svenis pro la surprizo.

Li ekprenis mian dekstran brakon kaj ni ekiris en la arbaron.

Ni iris longe ĝis atingis grandan rokon.

-Ni alvenis – li diris trankvile, kaj el sia poŝo elprenis strangan tubon.

-Kio ĝi estas? – mi demandis aŭtomate, sed ankoraŭ mi ne sciis, por kio mi estas tie ĉi.

Li ekridetis mistere kaj direktis la tubon al la roko. Li ne respondis. Mi ekscitite atendis.

El la tubo viola lumo eliĝis rekte al la plata flanko de la roko, kiu neatendite malfermiĝis kaj mi ekvidis enirejon subteren.

-Kion vi deziras de mi? – demandis mi denove de la fremdulo.

Tiam li alrigardis min kaj diris:

-Nun vi malsupreniros kaj portos por mi la suban trezoron.

-Ĉu vi ne venos?

La fremdulo neis per sia kapo kaj montris al mi, ke mi ekiru. Antaŭ ol ekiri li donis al mi poŝlampon por ke sube mi povu lumigi

Mi konfesas sincere, mi ege timis, ĉar mi ne sciis, kio okazos sub la tero. Eble li trompos min kaj poreterne mi restos tie.

Li ne plaĉis al mi. Mi jam ĉagreniĝis, kial je lia unua invitvorto sekvis lin.

Tremante mi ekiris malsupren. Mi jetis ankoraŭ kelke da rigardoj al la fremdulo. Mi esperis, ke fine li revenigos min.

Sed ne tiel okazis. Mi sola devis malsupreniri.

Ne longe mi povis timi, ĉar post kelkaj paŝoj min atendis surprizo en la groto. Ĉie kuŝis trezoro, oro, arĝento, juvelo kaj Dio scias, kio ankoraŭ.

Mi plenigis la sakon kunportitan kaj reiris al la fremdulo. Sed antaŭ ol reiri venis grandioza ideo en mian kapon. Nun jam mi scias la lokon de la groto kaj kiam ajn mi povos reveni tien ĉi. Eble ekzistas ankaŭ alia eblo enpenetri la groton kaj mi povos akiri la trezoron.

Mi transdonis la sakon da trezoro. Ŝajne la fremdulo estis kontenta. Li donacis al mi malgrandan ringon el arĝento kaj li malfermis la groton per sia mistera tubo.

-Mi dankas vian helpon –li diris kaj adiaŭis de mi. Kun grandaj paŝoj li malaperis en la arbaro. Mi estis lasita ĉe la roko en kiu kaŝiĝis groto da trezoro.

Mi ĝojis, ke mi sukcesis saviĝi de la fremdulo kaj tuj komencis fari planon, kiel akiri la trezoron.

Mi hejmenkuris por pioĉo kaj rastro por kiuj mi povos eniri la groton denove.

Pri mia aventuro mi rakontis al neniuj. Mi volis sekreti la groton. Por akiri la trezoron ŝajnis facile. Post kelkaj horoj mi fariĝos milionulo, eĉ eble la plej riĉa homo sur la tuta terglobo.

Mi tiel revadis dumvoje.

Vere mi ne komprenis, kial mi estis bezonata por la fremdulo? Kial mi estis sendita nur mi en la groton?

Fine mi konstatis, certe li estas stultulo kaj mi havis bonŝancon por akiri la trezoron.

(daŭrigota)

-Apáti Kovács Béla-

## Por infanoj



Inter la altaj montopintoj vivis ventopaĉjo kaj ventopano. Ili havis filinon Venteto.

-Filineto mia – diris iutage la ventopano – Nun mi devas iri al la vendejo. Vi restos hejme sola. Mi petas vin, la pordo ĉiam estu ŝlosita ĝis mi alvenos hejmen. Ne forlasu la domon!

Venteto promesis, ke ĉio estos en ordo kaj ŝi estos obeema knabino.

Sed la ventopano apenaŭ foriris, ekaperis la vulpo ka diris al Venteto:

-Sal'! Ĉu vi venos ludi kun mi sur la floran kampon?

--Nun mi ne povas, ĉar mi promesis al mia panjo, ke mi estos obeema knabino.

-Ho, tiu flora kampo estas tute proksime al via domo. Vi rimarkos, se panjo via alvenos sur la vojeto – ruzetis la vulpo.

Ĝi tiom konvinke parolis, ke ŝi fine sekvis la vulpon. La knabino estis ekscitita, kaj forgesis ŝlosi la pordon de la domo. Tion ekvidis la pigo kaj kaptis la okazon. La pigo ŝteliris la domon. En la tagĉambro estis lasitaj la familiaj trezoroj. Ĝi ĝuste volis ŝteli ilin kiam bonŝance ekaperis ĉe la pordo la ventopano kaj forpelis la ŝteliston.

Komprenble Venteto kun la vulpo ne rimarkis la ventopanon hejmevenintan, ĉar ili tiom feliĉe ludis.

Estis malhela vespero, kiam Venteto hejmeniĝis. Ĝia patrino malgaje akceptis sian filineton kaj ĝi diris:

-Kara mia vi ne obeis al mi, kaj lasis lapordon malfermia. La pigo preskaŭ ŝtelis la familiajn trezorojn.

Je tio Venteto ekploris kaj ege, ege hontis.

-Panjo mia, ĉu nun vi koleras?

-Ne, sed mi estas trista, ke mia filineto estas tiom malobeema.

-Kara panjo mia, pardonu min, mi promesas, en la estonto mi ĉiam estos obeema. Mi ne lasos malfermita la pordon.

Komprenble ĝia panjo pardonis, ĉar la patrinoj ĉiam pardonas al siaj filinetoj

-Onklo Adalberto-